*Freneza Revuo Esperantista Ŝatanta Observi*

N-ro 7 (50)

# FREŜO

La julio 2017j

Lipiec 2017 r.

Aperos ĉiumonate,
r mi firman volon prepari ĝin :-)



## Mi trovis por vi en TTT-ejo

# Jen diras la Ĉefredaktoro

*Frivola Revuo Efemera kun Ŝokantaj Obscenaĵoj*

**FREŜO**

**N-ro 7 (50)**


**La julio 2017j**

La retrevuo estos senpaga nur por ĉiuj kiuj volas ricevi ĝin

Aperos ĉiumonate, se sufiĉos por mi firman volon prepari ĝin

**Lipiec 2017**





*Gramatikon mi ne konas kaj gazetojn ne abonas...*

*"ESTAS MI ESPERANTISTO" - Julio Baghy*

Se vi volus elŝuti antaŭajn numerojn de "FREŜO"

musklaku unu el subajn ligilojn
aŭ engluu en la ĝustan lokon en retumilo
aŭ simple enskribu ĝin en krozilo

FREŜO nr: 1/44 **https://goo.gl/TNJo7O**
FREŜO nr: 2/45 **https://goo.gl/TnY1zj**
FREŜO nr: 3/46 **https://goo.gl/o6myuE**
FREŜO nr: 4/47 **https://goo.gl/YWRPEj**
FREŜO nr: 5/48 **https://goo.gl/Y6erJu**
FREŜO nr: 6/49 **https://goo.gl/dQChYY**

--------------------------

*Se vi havus proponojn, materialojn por la venonta numero de ĉi revueto - skribu al mi:*

**fresxo@protonmail.com**
Skajpo: **marianzdankowski**

**Kunlaborantoj:**

*Eduardo KOZYRA*
*Franciszek WITUCKI*
*Mirka KUBICKA*
*Teresa POMORSKA*
*Henryk WOWER*

Recenzoj:
pri "FREŜO" ĉiam atendataj
*Mi petas kritiki -*
*speciale pro gramatikaj eraroj :-)*

*Se vi volus, ke ĉi-tiun belegan revueton ricevadu viaj geamikoj - sendu al mi iliajn ret-adresojn:*

**fresxo@gmail.com**
**fresxo@protonmail.com**

*Ĉefredaktoro:*
**Marian ZDANKOWSKI**
*poŝtel. +48 622 115 650; +48 (0) 604-079-141*

*Adreso: str. Limanowskiego 36 m 3,*
*10-343 OLSZTYN, POLLANDO*
*retadreso*: fresxo@protonmail.com
*Skajpo:* **marianzdankowski**

*Se vi volus instigi min ne nur pervorte (perforte):*

Bankokonto:
(IBAN) n-ro: PL 54114020040000380246602778
Ricevonto: Marian ZDANKOWSKI
Ricevontadreso:10-343 Olsztyn; Limanowskiego 36/3
BIC/SWIFT: BREXPLPWMBK
Bankadreso: BRE Bank S.A. INTERNET BANKING,
al. Pilsudskiego 3, 90-368 Lódz
SORT CODE: 11402004
Konto ĉe UEA: mzda-e

**Grave:**
*mi povas gvidi kvizo(j)n dum via E-aranĝo !*
*Vi kontaktiĝu min rilate al ĉi afero !*

"Wizardry labyrinth of lost souls"
"Magia labirinto de perditaj animoj"
















## La ĉefredaktoro skribas:

En la numero, kiun vi trafoliumos, mi, kiel Ĉefredaktoro, proponas spekti kaj eĉ tralegi... Ĉar oni valoras...

**Por pripensi:**
- la aferoj nekonataj por katolikoj
- kelkaj rimarkoj pri impostoj
- ege interesaj konsiloj de Bill Gates (speciale por junularo)
- kontinuo de novelo "Kial Usono fariĝu Japanio"
- interesa kaj nervoziga afero pri tio, ke Izraelo insiste premas restitui de judaj posedaĵoj
- eksperimento kun musoj, sed ĉu vere nur rilatas al musoj?
- pri kultura vivo; konsiloj kiumaniere oni devas rilati al aliaj

**Por amuzi:**
- "Senvorta vivo"
- "Virina vivo" (fascina)
- belaj fotoj en "Besta vivo"
- bela pentraĵo en "Arta vivo"
- freŝa magia kvadrato en "Enigma vivo" (provu solvi - sen kontroli sur la lasta paĝo)
- "Karikatura vivo" - provu diveni kiu estas kiu, sen kontroli sur la lasta paĝo
- por la unua fojo - ĉinaj anekdotoj

**kaj ankaŭ**
- sur kelkaj paĝoj (sube) estas konturoj de kelkaj urboj... ĉu vi konas ilin? Provu diveni sen indico sur la lasta paĝo.

**Se vi volus printi "Freŝo"-n, sendu unu ekzempleron por mi, ke mi ĝoju pro tio**

# Reagoj de Legantoj

kara marian:
saluton! kiel vi fartas?
mi elkore dankas via sendado la FRES'O.
mi gratulas vian laboron!
kore,
etsuo

Etsuo Mijos'i - JAPANIO

Saluton,

Mi neniam abonis tiun revuon kaj neniam komunikis mian retadreson al tiu revuo.
Bonvolu forigi mian retadreson el via datenbazo.

Francis Soghomonian

Hullo S-ro Marian, bonan tagon!
Mi momigxas João (Esperante, Johano; Portugale -- sonas Jxoaun, plimalpi).
Mi ricevi vian e_leteron pri la lasta numero de via e_revuo FRESXO. Tre interessa kaj sxategis gxin.
Oni de povas diri cxu mi estas esperantisto aux ne, sed mi apogas la movadon. Mi estas ano de Kultura Kooperativo de Esperanto en Rio de Janeiro, Brazilo.
Mi lernis Esperanto kaj dauxrigas gxian lernardon hejme. Mi estas kapabla kompreni gxin iomete. Mi kredas ke gxi DEVAS esti la dua lingvo por la popolj en la mondo, cxu ne?
Eperante via.

SOARES Joao Gomes

Mi deziras informi Vin, ke en Krzeszowice (Pollando) mortis meritplena Samideano,
ankau pentristo Andrzej Kolpanowicz



Kubo

# V I R T U A L A   V I V O




**Aleksandro La Sesa (Redrigo Borgia) permesis enloĝiĝi en Romo por Judoj ekzilitaj el Hispanio (*1942*), el Portugalio (*1497*) kaj el Provenco (*1498*)**




**Se ni agnoskas, ke Grekaj kaj Romaj Dioj estas nun sensignifa mitologio**

**ĉu alia estos sorto de dioj, kiujn ni hodiaŭ adoras ?**



**Diferenco inter eksperto pri religioj kaj kredanto de ajna religio estas plimalpli kiel inter psikiatro kaj frenezulo**


Emil Cioran (1911–1995)



**Dum klinika morto - travivaĵoj en ĉi momento ne dependas de sekso, de sociaj kaj demografiaj karakterizaĵoj, kaj de aĝo - ĉar eĉ infanoj povas senti ilin.**

**Estas interese, ĉar neniam okazis ke islamano havis vizion de Jesuo kaj kristano renkontiĝis kun Budho. Ĉiu spertas spiritan travivaĵon kongruan al sia kredo.**

**Estis ankaŭ personoj, kiuj, malgraŭ klinika morto -travivis nenion.**



**En la mondo abundas amasego de malbono, tial estus blasfemo de la ekziston de Dio**

**Tadeusz Kotarbinski**



# La aferoj nekonataj por katolikoj

**La jaro 769**

Koncilio en Laterano establis novan dekreton, kiu rilatis al elekto de papoj. Pretendi al la elekto povas nur pastro. La laikajn personojn oni senigis tiu rajto, precipe rilatis tio al la romiaj oligarkoj.

**La jaro 783**

Oni enkondukis kutimon kisi piedojn de papo.

**La jaro 813**

Oni establis Feston de Ĉieleniro de la Dipatrino.

**La jaro 835**

La papo Johano XI establas apartan feston omaĝe al Ĉiuj Sanktuloj – la 1-an de novembro.

**La jaro 897**

Kadavra koncilio. La papo Stefano La Sepa eltombigas unu el siaj antaŭuloj (kun kiu li kon-kuris pri la posteno) kaj aran-ĝas por la kadavro kelktagan proceson. La akuzakto entenas tri kulpigojn: falsan ĵuron, troigitajn ambiciojn kaj trudenpaŝon de kanonoj. Kiel puno oni fortranĉas tri fingrojn al la kadavro, sekve elĵetis lin el trono, ŝanĝis la papajn kovraĵojn je ordinaraj vestoj, tiris tra la stratoj de Romo kaj fine enĵetis lin en la komunan tombon, en kiu oni entombigas malriĉulojn. Post kelkaj tagoj la papo Stefano La Sepa konkludas, ke la puno estis malgranda kaj denove ordonas eligi la kadavron de Formozus el la komuna tombo kaj ĵeti en la riveron Tibero. Kelkajn tagojn pli poste Stefan la Sepa forpasas pro „subita morto" kaj popolo de Romo eltiras la kadavron de Formozus el la rivero.



**Anĝelo kaj diablo**

**X jarcento**

La tuta Eŭropo troviĝis sub la regado de Eklezio. Stagnas akiveco sur kampoj de medicino, tekniko, scienco, edukado, arto kaj komerco. Komenciĝas sombra periodo en la historio de Eŭropo. Odo el Cluny proklamas: „Ĉirkaŭpreni virinon estas same kiel ĉirkaŭpreni sakon da sterko …". En la tuta Eŭropo regas papoj. 95% de la loĝantaro estas analfabeta; homoj vivas en obskureco kaj malpuro; akvo estas opiniata kiel damaĝa por la sano kaj lavado de korpo kiel peko; floras superstiĉoj kaj sorĉaĵoj.

**La jaro 904**

En Eklezio komenciĝas periodo de tn. pornokracio (saeculum obscurum), periodo dum kiu regas dek du laŭvicaj papoj, kiuj kaŭzas definitivan disdividon de kristianismo je orienta kaj okcidenta partoj. Kelkaj virinoj por dekkelkajn jarojn ekregas en Laterano. Ne povante mem meti sur siajn kapojn la papan kronon, ili regas en Eklezio pere de siaj amantoj kaj filoj, fariĝande fakte papinoj. Kiel la ĉefa heroino de la pornokracio-periodo estas rekonata Marozja Mariuccia, senatorino kaj patricino de Romo, naskiĝinta ĉirkaŭ la jaro 890, filino de Teodora, la amantino de Sergio La Tria, patrino de Johano XI, avino de Johano de XII, onklino de Johano XIII, praavino de Benedikto VIII (1012-24) kaj Johano XIX. Al parto de ŝia politiko apartenis ankaŭ ŝanĝo de edzoj; du el ili – Gvidon kaj Hugon estis ŝiaj fratoj. Laŭvicaj papoj legalizis tiujn geedzecojn.

**La jaro 904**

La papo Sergio La Tria murdas siajn antaŭulojn (Leon V kaj Kristoforo) kaj danke al la apogo de Teodora Pliaĝa ekposedas la papan tronon. Sergiusz post nelonge delogis la filinon de sia mecenatino kaj amantino, 15-jaran belegan Marozja, kiu naskis la filon, unu el la sekvaj „sanktaj patroj", Johanon XI.

al la sepa paĝo



# SENVORTA VIVO










# VIRTUALA VIVO (2)

el la kvina paĝo

**La jaro 955**

La papan tronon okupas dekokjara Oktawian (la nepo de Marozja), kiu alprenis nomon Johano XII. La juna Oktawian kontraŭe ol liaj antaŭuloj havas en Romo regon kaj spiritan kaj sekularan. Oktawian kredas dion Jupiter kaj diion Venus, sur la kolo portas saketon kun protektantaj lin amuletoj. Dum lia regado diboĉado atingas zeniton. La laterana palaco fariĝas prostituejo por la „ora junularo", filinoj kaj filoj de patricioj kaj „sorĉisma templo". Hetajroj kaj sorĉistinoj estas pagataj per kalikoj servantaj al diserva vino kaj per aliaj devotaĵoj. Lia granda amo estas ĉevaloj. En staloj okazas diservojn, la dekjaran knabon Johano XII nomumis kiel diakonon. Simile kiel Kaligula, sian plej ŝatatan ĉevalinon li nomumis senatoro. Johano XII kronigis la reĝon de Germanio Otton I imperiestron. Li perdis vvivon murdita de edzo de la amantino.

**La jaro 966**

Enkonduko de kristianismo en Pollandon. Kristianismo ne toleras kunekziston de aliaj kredoj, religioj kaj dioj. Komence tio miras tolereman politeismon de slavoj. Estas detruataj ĉiuj simboloj de la patra kredo. Sur lokoj de bruligitaj sanktaj boskoj kaj ruinigitaj temploj oni starigas preĝejojn, en tagoj de la tradiciaj festoj oni enkondukis ekleziajn (kristanajn) festojn, la lokajn diojn oni anstatŭis per kulto de sanktuloj (ekzemple Brygis – sankta Brigida) Kiel skribas la episkopo Thiemar: *„En la pola ŝtato popolon on devas gardi kiel brutaron, helpe de vipo kiel obstinan azenon. Se oni ekzemple konstatis, ke iu manĝis dum granda fasto viandon, oni severe punis tiun rompante al li dentojn. La dia leĝo enkondukita en tiun landon, fariĝas pli kaj pli forta, per apliko de perforto ol fasto establita fare de episkopoj"* (VIII,2). Ĝis la fino de XVIII jarcento tiu proceso finiĝis per forpuŝo el la socia konscio la tutan slavan religian tradicion, kiu parte estas detruita kaj parte transformita kaj englutita per la kristiana sistemo.




**La jaro 983**

Granda slava ribelo kontraŭ kristianismo.

**La jaro 993**

La papo Leono La Tria komencas kanonizi forpasintojn (mortintojn).

**La jaro 1000**

Kristanoj kredis pri malliberigo de Leviatano en la jaro 317 en subteroj de Laterano (tiama sidejo de papoj) fare de la papo Sylwester I. Magio de la ronda nombro 1000 sugestis atendi eksterordinarajn okazaĵojn. Aŭguraĵo de Sibilla antaŭvidis, ke en ŝanĝo de jarmilo la monstro forkuros el malliberejo kaj detruos la Teron kaj la Ĉielon. Teruron fortigis konverĝeco de tiuj aŭguroj kun novtestamenta Apokalipso de la Sankta Johano. Signon de katastrofo oni serĉis ankaŭ en la persono de la tiama papo, kiu onidire praktikis magion (li konstruis horloĝojn kaj astronomiajn instrumentojn) kaj aldone surprenis la nomon Sylvester II, kion oni asociis kiel ideon: ***„unu Sylester malliberigis la monstron, la dua liberigos ĝin"***. Kiam la atendata katastrofo ne venis la papo ordonis/anoncis tempon de amuzoj kaj preĝdankoj por Dio pro Lia bonkoreco kaj savo de la mondo. Tiel ekestis KARNAVALO.



# POLITIKA VIVO



**Ĉiu deka Germano havas judajn prapatrojn - laŭ studo de svisa firmao "Igenea".**
Nur 6% de Germanoj havas germanajn radikojn.
Eĉ 30% de Germanoj venas de slavoj kaj la resto estas (plejparte) posteuloj de Keltoj.




**Pollando estas la sola lando, kiu konkeris Moskvon.**

**Nek Hitlero, nek Napoleono sukcesis tion.**




Kiam la 9-an de majo 1945 jaro je la 1,15 horo oni anoncis en Sovetio la kapitulacon de Germanio - meznokte sur stratoj de urboj aperis homamasegoj ĝuante pro la fino de milito.
Tutlanda ĝojo kondukis al tio, ke postan tagon en la tuta lando elĉerpiĉis vodko.

adidas®


**Laŭ siaj principoj - la firmao "Adidas-o" ĉiam nuligos reklam-kontrakton kun ĉiu sportisto, kiu havos iun ajn rilaton kun la Eklezio de Scientologio.**




**Svislando kaj Turkio estas solaj gravaj landoj en Eŭropo, kie la ĉefurbo ne estas samtempe la plej granda urbo.**




Memoru, ke la germana vorto: "**Konzentrationslager**" dum la Dua Milito signifis : "Germana Morto-Tendaro".



# IMPOSTOJ

En antikva Ateno oni pagis imposton nomata eisphora, kiu validis nur dum la milito kaj financis militaj agoj kaj vivteno de soldatoj.

Se la milito estIs venka la atenanoj rericevis parton de la imposto.

La romia cezaro Vespasiano ordonis meti imposton por ĉiuj publikaj necesejoj en la Eterna Urbo.

La impostoj en la romia imperio ne estis tamen ĝenaj, komence de la ekzisto de imperio tio estis 1% de posedita havaĵo, dum milito la imposto kreskis ĝis 3%.

Plebo pagis ĉiujare negrandan imposton de la „kapoj” t.n. pokapa imposto, sed tiun ne pagis vidvinoj kaj infanoj.

Ekzemplo de la protesto kontraŭ alta imposto estis historio de Lady Godiva. Ŝi, estinte edzino de la lordo Coventry Leofrica III reganta en dukujo Mercja dum la frua mezepoko, defende de siaj subpremitaj per altaj tributoj regatoj trarajdis sur ĉevalo tra urbo tute nuda. Rezulto de tio estis malatigo de la trubutoj.

Fine de XVII jarcento la imperiestro Piotr la Granda enkondukis en Rusio imposton de barbo. La celo de tiu imposto estis eŭropeigo de la rusa nobelaro, la longbarbuloj ŝajnis al li simbolo de malprogresemo. Aŭ barboj oni forrazis aŭ barbulo pagis imposton je 2 kopekoj ĝis eĉ 900 rubloj.

La enspezan imposton preskaŭ en sama formo kiel hodiaŭ oni enkondulis en Anglio dum la napoleonaj militoj.

Plej alta tarifo egalis 10%. Ne pagis imposton nur la plej malriĉaj, enspezantaj malpli ol 200 pundojn.

Valoras aldoni, ke tiama averaĝa monata pago estis ĉirkaŭ 20 pundojn.

En Pollando unuformecan impostan sistemon por financi centmilsoldatan armeon establis la Granda Sejmo debatanta en 1788-1792. Oni establis, ke imposto de la nobela havaĵo estos 10% kaj de la eklezia havaĵo 20%.



Neformala (geedzeca) imposto

**imposto** - deviga kontribuo de civitanoj al la ĝeneralaj bezonoj de ŝtato, urbo ktp;
**laŭenspeza imposto** - imposto, bazita sur la sumo de ies enspezoj dum difinita periodo;
**nerektaj impostoj** - impostoj, enkalkulitaj en la prezoj de varoj k sekve ne rekte pagataj de la konsumantoj;
**limimposto** - dogano
**pontimposto** - imposto pagota, por trapasi ponton
**salimposto** - imposto ĉe la uzado de salo
**sangimposto** - devigo de la milita servado
**terimposto** - imposto super la posedata tero
**ekoimposto** - impostsistemo, en kiu konsiderinda parto de la impostopagoj rilatas al la mediproblemoj kaŭzataj de iuj produktoj, produktoprocedoj aŭ kondutmanieroj: ekoimposto estas ankaŭ nomata «verda imposto»

# VIRINA VIVO



**Virina logiko**
"... kaj ke li estu riĉa kaj amu min tial,
ke mi ne estas kun li pro la mono"







**Virina logiko**
Simpla kiel ronda kvadraturo




**Virina logiko**
Neniam rigardu ulon, kiu plaĉas al vi... atendu ĝis li mem
(per iu magia maniero) ekscios tion kaj faros la unuan paŝon




**Virina logiko**
Virino scias, sed ne diros, ĉar ŝi deziras
aŭdi tion de li...
li ne scias (sed li devas) tamen finfine ion diros...




**Ina histerio**
estas provo klarigi la inan logikon
pere de ina intuicio



# J E N  D I R A S  B I L L  G A T E S

**Oni devus pendigi suban tekston en ĉiuj lernejoj kaj laborlokoj! Oni povas lin ami aŭ malamegi. Bill Gates prelegis laste en iu lernejo pri 11 aĵoj/temoj, kiuj oni ne instruos en lernejo. Li opinias, ke senstresa kaj politike korekta instruado edukis generacion de infanoj sen ideo pri realeco kaj submetas tiun generacion je malsukceso en la reala mondo.**

1. La vivo estas maljusta – kutimiĝadu al tio!

2. La mondon ne interesas via memfido. Ĝi postulos de vi, ke vi atingu ion antaŭ vi kontentos pri via memfido.



3. Vi ne perlaboros multege tuj post la finiĝo de liceo. Ankaŭ vi ne tuj estos estro kun aŭto kaj poŝtelefono, ĝis kiam vi ne perlaboros por tio.

4. Se vi opinias, ke via instruisto estas postulema, atendu ĝis kiam vi havos estron.

5. Laboro en kuireo aŭ ĉe lavado de malpuraj teleroj kaj ĝenerale vazaro ne misfamigas vian dignon. Viaj geavoj determinis tiajn okupojn alie, ili nomis ilin **ŜANCO**.

6. Se vi misfaros, ne kulpigu pri tio viajn gepatrojn, ne priploru tion, nur traktu la erarojn kiel instruon. Por ke tiuj ion lernigu al vi.

7. Antaŭ ol vi naskiĝis, viaj gepatroj ne estas tiom enuaj kiel ili estas nun. Ili fariĝis tiaj, ĉar ili devas pagi viajn fakturojn, ordigi viajn aĵojn kaj aŭskulti kia vi estas ekstra laŭ la propra opinio. Do antaŭ ol vi savos la pluvaj arbaroj de pesticidoj, la arbaroj de viaj gepatroj, ordigu sian propran ĉambron.

8. Via lernejo iel sukcesos/malsukcesos kun gajnintaj kaj malgajnintaj, sed la vivo ne! En iuj lernejoj oni ĉesis priktaksi la lernantoj negative kaj oni donas al ili tiom da eblecoj plibonigi la notojn, kiom ili bezonas. Tio estas vojo nenien, **EN LA VIVO NE ESTOS TIAJ EBLECOJ.**

9. La vivo ne estas dividita je studjaroj. Dum la vivo vi ne havos dumonatajn somerajn feriojn kaj ne multaj labordonantoj estos interesitaj por helpi al vi retrovi **VIN MEM**! Pri tio vi mem okupiĝu.

10. Televido ne prezentas veran vivon. En la vera vivo oni devas en certa momento forlasi kafejeton kaj iri en laborlokon.

11. Estu afablaj por la lernejaj sentaŭguloj – povas okazi, ke iu tia estos estontece via ĉefo.




70% de viroj post la 70j
povas ankoraŭ havi erekton
kaj gvidi sukcesan seksan vivon


De seksa prepar-ludo dependas
intenso de ina orgasmo


FAKTOPEDIA.pl
Ofta seksumado plibonigas kvaliton de spermo


Matena sekso tre pozitive efikas por sano
kaj aspekto de la homoj.
Koito kun partnero matene ne nur fortigas
imunan sistemon kaj preventas
malvarmumojn sed ĉefe plibonigas
kondiĉon de hararo, haŭto kaj ungoj.


FAKTOPEDIA.pl
Spertante 200 orgasmoj jareoni povas "nuligi"
fizikajn simptomojn de maljuniĝo preskaŭ je 6 jarojn


FAKTOPEDIA.pl
Dum koito la cerbo ricevas grandan kvanton de
sango, fluas al ĝi masiva dozo de oksigeno, kio
signife plibonigas nian kapablon pensi logike.



Daŭrigo el antaŭa numero

## Kial Usono fariĝu JAPANIO

*de Barry Friedman*

"Uĥĥĥĥ! Denove?! Ĉu via komputila sistemo ne jam havas tion? Tio estas la kialo por komputiloj kaj datumbazoj! Por stoki la tutan informon por ke la homoj ne bezonas memori tion denove kaj denove! Komputiloj! Robotoj! Datumoj, PC-oj, durdiskoj, gigabajtoj, megabajtoj, http-oj, la mondo-larĝo-araneaĵo, la maŝinoj kaperas, la Ĉesanto regas la teron kaj forviŝas la homaron. Mi reproduktas la saman polisan nombron. Mi diras al ŝi tre eksplicite, "Al la aŭto la antaŭa maldekstra pneŭo mankas, ekzistas nur tri pneŭoj sur la aŭto. Bonvolu memori do sendi la kamionon, kiu povos levi aŭton al kiu mankas pneŭo." "Tio ne estu problemo, sinjoro." Ĉio estas ĉiam neniu problemo. "La kamiono estos instalita kun speciala rado-altiga boĝio por levi vian aŭton kiu ne havas pneŭon." Dankon. Gracias. Grazie. Kamsa Hamnida. Xie Xie. Origato gozaimasu." "Bone, mi dankas vin, sinjorino." Hm, mi supozas ke ŝi ne scipovas la hispanan, la italan, la korean, la ĉinan, kaj la japanan. Kia malklerulino. Ĉiu homo devu povi paroli ĉiujn tiujn lingvojn flue.

Alia horo pasas, alia horo de malsato kaj malpacienco kaj furiozo kaj rankoro al la sistemo, la sensencaĵo, la unu-afero-post-alia-afero, la turniĝadoj kaj kirliĝoj de la moderna kapitalisma diktatoreco kaj la militem-leĝo kiu vere regas la tiel nomata libera mondo, ke Usono provas trudi al ĉiuj senhelpaj triamondaj landoj per tut-terena bombado, ŝok-kaj-timaj taktikoj, la neniigo de Alepo kaj aliaj siriaj urboj en la mortfesto de la senfina civila milito inter la insida mava fireĝimo de Bashar-al -Assad kaj la ribeluloj kiuj volas re-nobligi Sirion denove. Ili prenis paĝon aŭ du el la Usona politika manifesto. Karlo Markso kaj Donaldo Trumpo laboris kune por eldoni siajn librojn kaj atingi tut-mondan publikon, eĉ la Sirianojn. Ĝi estas vere treega konsiderinda momento en monda historio. Fine, kamiono venas. Ĝi estas kondukita per juna afro-usona viro, sinistra kaprobarbo, brilaj blankaj dentoj, kalva, kapabla, li scias sian taskon, tre ĝentila, eble iom malkomforta pro laborado por blankulaj homoj. Ekzistas diĥotomio kaj kelkfoje malica rilato inter la nigruloj kaj la blankuloj ĉi tie en Usono. La nigruloj kulpigas la blankulojn por jaroj de sklaveco, rasismo, subpremado, misuzo, neado de bazaj civilaj rajtoj. La blankuloj vidas la nigrulojn kiel homojn, kiuj efikaĉas ilian pacan Usonan socio; ili estas drogemuloj kaj bravulaĉoj kaj gangsteroj kaj prostituitinoj kaj prostituistoj, ili turnas sin al krimo, vulgareco, balaaĵo, nenieco, nescio kiel natura trajto alportita ĉi tien de la afrika ĝangalo. La ŝipoj de la Eŭrop-Afrik-sklavkomerco neniam estu alportita ilin de Eburbordo. La tribaj gvidantoj estu protektita sian popolon kaj ne estu vendita ilin al la malvirta blankulo. Sed ĉi tiu stup-kamiona ŝoforo ŝajnas esti sufiĉe amikema ulo. Li parolas en tiu unika nord-nigra dialekto.

"Bone, sinjoro, ĝi aspektas kiel ĉar la spaco super la alirvojo kaj la angulo, mi ne estos kapabla meti mian kamionon tie. Ĝi ne okazos. Vi devos voki alian stup-kamionon kun la boĝio." La indigno ŝveliĝas en mia patro.

"Sed ni diris al la asekuraj homoj ke mi bezonas kamionon kun speciala rado-altiga boĝio."

"Mia kamiono ne havas ĝin. Mi ne povas fari tion. Tiel estas la cirkonstancaro.

"Sed tio estas ridinda! Ni atendis unu horon por la unua ulo kiu ne povis helpi al ni. Poste alian horon ni atendis por vi kiu ankaŭ ne povas helpi nin! Kiu do diable povas helpi nin?! Huh ?!"

"Kiel mi diris, mi scias ke ne pravas, sed vi devas havi stup-kamionon kun boĝio. Tio estas la procedo por movi tiun aŭton. Mi povas fari nenion por vi."

"Nu, vi envenigas la malbenitan fikamionon ĉi tie senprokaste! Mi estas malsana pro la maltrankvilo kun vi aŭto-popolo! Mi bezonas tiun aŭton posttrenita al la malbenita fifireston-a aŭtoriparejo nun aŭ mi jurpersekutos VIN kaj la unuan mekanikiston kaj ankaŭ la asekurajn homojn ĝis vi ĉiuj estas sangaditaj seka! Ĉu vi aŭdas min?! "

"Kiel mi diris, mi ne penas stumbli vin. Vi devas alvoki dal ili por akiri stupon kun boĝio. Mi estas for de ĉi tie. Paco al vi." La ŝoforo tiam malrapide trotetas sur la strato, reen en la geton, aŭ en la antaŭurbojn aŭ en ajnan larĝan malferman ebenaĵon de la Granda Usona dezerto por rekomenci sian vivon de feliĉa nescio. Eble tiuj uloj kun la malplej kvanto de sciado estas la uloj kiuj retenas la plej kvanto de kontento kun sia ekzisto. Mia patro estas sur la rando de kompleta apopleksio, ŝaŭmo ĉe la buŝo, letargio, kiel Othello en Akto Kvar Sceno Du post Iago laboris sian sorĉon kun la trompo kiel la itala drogo mandragora, venenante la pensojn de Othello ke Desdemona-o estas malfidela kun Cassio, kaj prenis la poŝtukon de Othello, kiun la patrino de Othello aĉetis de egipta aŭguradistino. Ĉiuokaze, Patro estas livida.

"Ni devas voki tiujn di-damnitajn asekur-homojn denove! Nur forgesu ĝin!"

-o, Hiroŝimo, ĉiuj per trajnoj!

Daŭrigota



Dmytry Dementey

# POLITIKA VIVO

Cent kaj kelkajn dekojn da personoj, ĉefe infanoj kaj viri-noj trovis morton sub rubaĵoj, falintaj el la plej granda rubaĵ-ejo proksime de Adisabebo. Rubaĵoj falis sur slamsojn, en kiuj vivis homoj vivtenanta sin per ruboj trovitaj en la rubaĵejo.

Danke al kunordigitaj agoj de militŝipoj el kel-kaj landoj kvin jarojn daŭris paŭzo pri atakoj de somaliaj piratoj kontraŭ ŝipojn en proksime-co t.n. Korno de Afriko. Fine dekkelkajn atakantojn sukcesis kapti/ŝteli ŝipo-cisternon, navigan-ta al Mogadisz sub la flago de Sri Lanka.

Siergiej Aksjonov, la ĉefministro de la separa registaro de Krimeo, opinias, ke la plej bona formo de la reĝi-mo en Rusio estus monarkio. Ĝuste pasis cent jarojn de kiam oni murdis la lastan imperiestron.

La reganto de la Saudi Arabia decidis plibonigi la aspekton de la lando, en kiu la virinoj estas precipe malsimpatie traktataj. Li establis specialan Konsilion de Virinoj. Dum la unua kunsido renkon-tiĝis nur viroj.

Iu ĉino, ne havante monon por vojaĝi, decidis bicikli al malproksima je 2000 kilometrojn domo, por pasigi/festi kun la familio Novan Jaron. Kiam li trabiciklis jam



**En komercon oni iras por la mono.**
En politiko oni iras por vere grandega mono.
**Grzegorz Schetyna - pola politikosto**

500 kilometrojn, policanoj informis lin, ke … li biciklas en kontraŭan direkton.

Ĉinio instalis proksime de la limo kun Rusio katapultojn de obusoj Dongfeng-41. Proparolanto de Kremlo Dmitrij Pieskow ne trovas tion ie ajn minaca. „Pekino estas nia strategia aliancano" – li konstatis.

La klubaj gadĝetoj de Real Madrit , produktataj por la araba merkato estos modifitaj. Blazono de la reĝa teamo estos senigita kruco ĝis nun tro-viĝanta sur krono. La kruco estas por muzulmanoj „afero ofendiĝema/ĝena".

La registaro de Tel-Avivo decidis akcepti 100 orfojn el Sirio, al kiuj ĝi helpos trovi adoptajn familiojn inter la israelaj araboj.

Nekredeblan bonŝancon havis loĝantino de Shreveport en Teksaso. Post la ekaŭdo de averto pri proksimiĝanta ciklono ŝi kaŝis sin en bankuvon, kiun ventego forportis kaj lasis en en proksima arbaro. La tuta aventuro lasis por ŝi nur kelkajn bagatelajn vundetojn.

Eike Batista, 60-jara brazila entreprenisto antaŭ nelonge troviĝis sur la listo plej riĉaj homoj de la mondo sur la oka pozicio. Nun troviĝis sur la kapt-ordona letero de Interpol, serĉata pri grandegaj koruptaj aferoj. Inter alie li pagis 16 milionojn da dolaroj por guberniestro de la ŝtato Rio de Janeiro por profita registara kontrakto.


Longiĝanta antiterorisma escepta stato en Francio kaŭ-zis ke tiamaj malliberejoj estas tro plenigitaj per homoj suspektataj pri la islama radi-kalismo. Probable troviĝas en ili preskaŭ 70 milojn. Tia den-sigo de malliberajaj ĉambroj minacas per ribelo, al kiu instigas malliberulojn la estroj de ekstermistoj.



# B E S T A   V I V O






















## Izraelo insiste premas pri la afero de restituo de la judaj posedaĵoj

Ekde multaj jaroj la Juda Ŝtato ne engaĝiĝis mem al la aferoj de restituado de la posedaĵoj, lasante tiun problemon por la judaj organizaĵoj. Nun oni ŝanĝis tiun taktikon. Sub laŭ aspicioj de la ĉefministro Benjamino Netanjahu estis fondita Grupo Speciala pri Restituo de Posedaĵo el la Periodo de Holokaŭsto laŭ la angla epitomo: **HEART**, aŭ koro). Kiel publikis la juda *„Forward”* eldonata en Usono, la celo de tiu grupo estas akiri rekompencojn de Orienteŭropaj landoj kontraŭ la juda posedaĵo-perdo. Ĝia gvidantaro ne ekskludas prezenti grandan juĝan alvokon kontraŭ la registaroj kiuj malaprobas la pagon. „ **Se tio okazus** - komunikis la ĵurnalo – **Pollando, en kiu antaŭmilite loĝis plejmulte de judoj, estus la plej granda perdinto**. HEART estas la entrepreno laŭ granda skalo. La Izraela registaro subvenciis ĝin per 2,6 milionoj da dolaroj pojare dum tri jaroj. En Usono en ĉefaj ĵurnaloj estos elaĉetitaj reklamoj kaj sur la ekranoj de la nov-jorka „Times Square” ĉiun duonhoron aperas la speciala reklamo. Al HEART-infolinio telefonis jam kelkdek miloj da judoj devenantaj de la Orienta Eŭropo.


La projekto konsistos el du partoj. Unuavice estos kompletigita la bazo de donitaĵoj pri ĉiuj pretendoj anoncitaj de la vivantaj proprietuloj de nemoveblaĵoj aŭ de ties heredantoj. Kaj do tio koncernas same la homojn, kiuj estus beneficjantoj de la pola leĝo, kiu ekde multaj jaroj estas preparata sed konstante prokrastata.

La dua parto de projekto premisas kompletigi plenan liston de la judaj posedaĵoj en la Orienta Eŭropo. Ankaŭ tiujn, kies proprietuloj estis murditaj aŭ mortis ne post-lasante la heredantojn. Konforme al la leĝo tia posedaĵo fariĝas la ŝtata proprietaĵo. Kiel komunikas *„Forward”*, Pollando multfoje avertadis la judajn organizaĵojn, ke tiuj ne traktu la aferon senkompromise kaj ne iniciatu la juĝan alvokon, ĉar tiuj agadoj povus bloki la ŝanĉojn arbitracie aranĝi la aferon per intertraktado.Tamen judoj ne intencas plue atendi.

Ekde 20 jaroj la sekvaj polaj registaroj, polaj ĉefministroj kaj prezidentoj promesas redoni al ni nian proprietaĵon. Kaj ĉiam tiuj promesoj estas senvaloraj. "

Do venis la tempo por agi – diris al la gazeto *„Rzeczpospolita”* Zeew Factor, la ĉefo de la **Fondaĵo por Helpo al la Saviĝntoj el Holokaŭsto en Izraelo**. Se tiu maljusteco okazus en Germanio, estus por mi ĉioegale. Sed tio okazas en nia Pollando, en kiu ni loĝis 900 jarojn kaj por kiu ni verŝis la sangon en la jaro1939" – substrekis la devenanta de Lodzo Factor.

Por Poloj pri tiu tuta afero estas surprizitaj. – Dum mia lasta renkontiĝo kun Netanjahu tiu temo ne estis tuŝata. La izraelidoj devus tion denove primediti. Eble gravas al ili la favoro flanke de Pollando dum ties prezidanteco? - konstatis al *„Rzeczpospolita”* eksa ministro Ladislao Bartoszewski, kiu respondecis pri rilatoj kun judoj. Polaj diplomatoj substrekas, ke la opinio de Varsovio restas senŝanĝa. – "Ni ne aplikas la ras-kriterion, sed tiun civitanecan. Se la proprietuloj estis civitanoj de la II Pola Respubliko kaj estis mortintaj senide, tiam ilian posedaĵon transprenas Pollando, kaj ne Izraelo aŭ la judaj grupoj el Usono" – diris al *„Rzeczpospolita”* la diplomato. Malkonsentas kun tiu opinio Kalman Sultanik, la vicprezidanto de la Monda Kongreso de Judoj. – Tiuj homoj estis ekstermitaj ne pro tio, ke ili estis poloj, sed pro tio, ke ili estis judoj. Do ilia proprietaĵo devus reveni al judoj – li diris al *„Rzeczpospolita”*. – Domaĝe perdi la tempon. La saviĝintoj de Holokaŭsto ĉiun tagon estas mortontaj, do tiuj monoj estas bezonaj, por helpi ilin – li aldonis. La reprezentantoj de HEART ankoraŭ ne kontaktiĝis kun la judoj en Pollando. – "Por ni la afero estas simpla. La leĝo pri proprieto estas sankta. Se vivas la proprietuloj aŭ iliaj heredantoj, tiam oni devas redoni la aktivaĵojn, kaj tio rilatas ne nur al judoj, sed antaŭ ĉio por poloj, kiujn germanoj kaj komunistoj prirabis disde proprietaĵo" – diris al *„Rzeczpospolita”* Petro Kadlcik, la ĉefo de la **Sindikato de Judaj Konfesiaj Komunumoj en Pollando**. Kion fari kun la aktivaĵoj, kiuj ne havas proprietuloj? Oni devas atingi kompromison, do la situacion, en kiu la ambaŭ flankoj estos egale nekontentaj. Eble oni devus el tiuj monoj krei fonduson, kiu povus financi revitaligon de la judaj antikvaĵoj en Pollando? - li substrekis. La polaj diplomatoj substrekas, ke **la juĝa alvoko kontraŭ Varsovio estus katastrofo por la pole-judaj rilatoj. En Izraelo vekiĝus antipolaj agordoj, kaj en Pollando la antisemidaj**. – Mi pensas, ke niaj izraelaj amikoj bonege tion komprenas kaj neniaj juĝalvokoj okazos. Tio tutcerte estas provo insiste premii nin pri la afero akcepti la reprivatigan leĝon – diris unu el diplomatoj.



# A R T A   V I V O



**Departure For The Hunt - Oil Painting by American Artist Edwin Lord Weeks**

# E N I G M A   V I V O

## FREŜA MAGIA KVADRATO

nur por tiuj, kiuj ŝatas pensi ! aliaj - lasu ĝin

1. ĉevala rapidkuro ..................
2. konstanta mendad' ...............
3. racia pensado ......................
4. fam', klaĉ'..............................
5. aranĝita por sendo ................
6. malflarad' ................ .............

| | 1 | 2 | 3 | 4 | 5 | 6 |
|---|---|---|---|---|---|---|
| 1 | | | | | | |
| 2 | | | | | | |
| 3 | | | | | | |
| 4 | | | | | | |
| 5 | | | | | | |
| 6 | | | | | | |

**Kiumaniere vi solvos krucvortenigmon**

Unue oni devas iomete pripensi !
Por ke solvado estu pli klara - enskribu majuskle literojn!
Per sageto eniru kvadrateton kaj musklaku ĝin
(per maldekstra puŝbutono).
Enskribu ĝustan literon de la vorto kaj iru al sekva kvadrateto. Enskribu sekvan literon kaj iru ... ktp, ktp.
Por kontroli ĝustecon de magia kvadrato - iru al la lasta paĝo... SED...
Unue vi devas iomete pripensi...



# SCIENCA VIVO

## Eksperimento

En la scienco konata estas eksperimento de John Calhoun, kiu kreis utopiecajn kondiĉojn por musoj.

Ili vivis en la ejo tri-cent kvadratajn metrojn granda.

En ĉi tiu artefarita medio por ili estis neniuj rabobestoj, ili havis eblecon uzi materialojn necesajn por konstrui nestojn, trinkaĵoj kaj manĝaĵoj por ili estis laŭbezone.



Ĉiuj iliaj eventualaj malsanoj likvidis la esplorist-personaro gvidanta la eksperimenton.

Oni enlasis kvar masklojn kaj kvar femalojn.

Tiam eksplodis amor-aktivado inter la bestoj, rezulte de tio komenciĝis grandega multobliĝo.

La bestkvanto multobliĝis ĉiun 55 tagon.

La musnombro kreskis kaj oni povis supozi, ke la konflikto eksplodos tujtuje pro la manko de loko, sed tamen konduto de musoj komencis ŝanĝiĝi.

Ĉar ĉio bezonata abundis, necesis ĉasi nenion, ne ekzistis devigo fuĝi antaŭ malamikoj.

Tiam superfluis la gepatra edukado.
La patro aŭ patrino nur montris al la ido: venu ĉi tien, premu perpiede ĉi tion kaj jen aperas akvo; poste venu ĉi tien, premu perpiede ĉi tion kaj jen aperas manĝaĵo...


Sed poste montriĝis, ke muskvanto duobliĝas nur post 135 tagoj.

Iumomente loĝantaro komenciĝis ŝrumpiĝi - ĝis la plena malapero.

Kial? Kio okazis? ĉar musoj eĉ ne volis praktiki la amoradon. Unue la patroj aperigis neniun deziron eduki siajn idojn. La femaloj transprenis la patrecan rolon.

Tio estas unu el la plej gravaj eksperimentoj kiu montras, ke la absoluta prospero povas kaŭzi ni mem enfalos en nian propran embuskon. (il)





Dmytry Dementey


# KARIKATURA VIVO



















Solvo sur la lasta paĝo

# KULTURA VIVO




15 PRINCIPOJ DE LA BONA EDUKO, KIUJN ĈIU DEVUS KONI!

Sendepende de tio, kion pri la temo de la ĝentilaj manieroj opinias nia ĉirkaŭantaro, tamen tiuj estas indikoj de la bona eduko. Posedo de la ĝentilaj manieroj signifas: uzadon de korekta vortaro, emocian sinregadon, ordeman kaj puran aspektojn kaj afablecon.
Se vi inklinas ilin elrerni, bonvolu tralegigi ĉi-suban liston de la 15 principoj pri la eiketo.
Se iu persono iranta kun vi, intersalutas kun siaj renkontataj gekonatoj, tiam vi ankaŭ devus intersaluti kun ili, eĉ tiam kvankam vi renkontus ilin nur la unuan fojon.
Ofta via kaŝrigardado al telefonpanelo dum societa renkontiĝo povas esti komprenigita de via gasto, ke viaflanke mankas interesiĝo pri la gasto kaj ke vi estas enuigita. Anstataŭ revolvi la instagramon dediĉu vian atenton al la personono, kun kiu vi ĉeestas.
Se vi estas viro, vi ne devas manĝi ,,sushi" per bastonetoj. Vi povas uzadi la manplatojn.

Intrfiksu kun neniu komunan vesperon, se vi intencas pasigi ĝin skribante kaj telefonante al aliaj personoj.
Se iu helpos al vi, ne forgesu danki tiun. Ĝi estas signo de la respekto kaj dankemo.
La siniorinoj neniam povus permesi, ke la viro portu ilian retikulon. La sinioroj ĉiam devas alporti virinan mantelon al vestgardejo.
Evitu la senvfruktan telefonan babiladon. Reprenu la konekton nur tiam, kiam ĝi estas vere grava.
Ne gapu al la homoj, ne ridu kaj ne parolu tro laŭte.
Se vi stiras aŭtomobilon, veturante tra flakon atentu, por ne ŝprucmakuli la piedirantojn.
Kiam en kinejo aŭ teatro vi direktiĝas al via sidloko, via vizaĝo devus esti direktita fronte al la personoj, kiujn vi preterpasas.
Kiam vi pardonpetas, kaj via pardonpetoj estas akceptitaj, neniam faru la saman eraron.
La ĝentilaj viroj estimas egale ĉiujn virinojn.
Ĉi aferojn lasu por vi mem: la aĝon, religion, tion, kion vi hontas kaj tion, pri kio vi fieras, problemojn pri la sano, donacojn, familiajn problemojn.
Ne postsekvu blinde la trendojn.
Senkonsidere al tio, ĉu io sur vi bone aspektas, vi povas renkonti priridon kaj kritikon.
Senrilate al via aĝo, profesio kaj stato, enirante ien memoru pri la saluto.
Observante ĉi-suprajn principojn estas la bonega maniero, por fari la mondon pli bona loko por ni ĉiuj. Kelkaj el tiuj ne estas facilaj, pro tio estas tre grave, ke tiŭj eniru vian sangon kaj fariĝu parto de via personeco. Ja la bonaj manieroj neniam fariĝas senmodaj, ĉu ne?

# DISTRA VIVO



Kiam mi diris ke vi estas permesita veni vendrede en vestoj de semajnofino, mi ne sciis ke vi praktikas nudismon...













el la pola — MRB — 9.06.2015

# ĈINA VIVO

**Rajdi sur azeno kun muelilo sur sia dorso**

Iu prunteprenis de sia bopatro muelilon kaj ĝoje rajdis sur azeno kunportante la muelilon sur la dorso. Preterpasanto miris: "Kial vi mem portas la muelilon? Estas pli facile rekte meti ĝin sur la dorson de la azeno." Kaj tiu respondis: "Kiel stulta vi estas! Ĝi estas jam tre laca sub mia pezo. Ĉu mi ne mortigos ĝin, se mi ankoraŭ ŝarĝos ĝin per la muelilo?"

**Komprenema filo**

Filo malbone lernas kaj petolas senĉese. Foje la patro plendis: "Miaj haroj griziĝos de maltrankviliĝo pro via petolado." Kaj la filo refutis kompreneme: "Ho, jes, la haroj de la avo griziĝis ghuste pro vi."

**Multekosta amo**

Junulo grumblis kontraŭ sia fianĉino: "Vi senĉese postulas de mi tion kaj tion pro la geedziĝo. Ĉu vi ne timas, ke aliaj opinios vin tro multekosta?" Respondis la junulino: "Ech Petoffi (fama poeto de Hungario) diris, ke la vivo estas valora, kaj la amo pli! Ĉu amo povus esti malmultekosta?"

**Ĉefministro kaj kampulo**

Emeritiĝinta ĉefministro estis revenanta hejmen kaj renkontis survoje kampulon, kamaradon en sia knabeco. Ambaŭ fariĝis ĝibaj. La ĉefministro diris al la kampulo: "Ho, ni ambaŭ maljuniĝis, sed ni havas kaj samaĵon kaj malsamaĵon." "Kion vi alŭdas?" "La samaĵo estas, ke ni ambaŭ fariĝis ĝibaj maljunuloj, kaj la malsamaĵo estas tio, ke vi vivas en la kamparo kaj mi en kortego." "Jes," diris la kampulo, "alian malsamajhon ni havas." "Kion tio signifas?" "Mia ĝibeco estis kaŭzita de longtempa lacega sarkado, priklado k.a., dum via ĝibeco kaŭziĝis de longtempa kliniĝo antaŭ la imperiestro..."



**Privata konversacio**

Geamantoj laŭte interparoladis en teatro. La bruo malhelpis maljunulon sidantan antaŭ ili bone aŭdi la dialogon de la aktoroj. Li ne povis elteni kaj kolere diris al ili: "Nenion mi povas audi!" "Kio koncernas vin? Tio estas nia privata konversacio!"

**Ŝanĝebla staturo de filino**

La patrino volis iri al koncerto kune kun la filino. Antaŭ eliro ŝi metis en sian mansakon paron da altkalkanumaj ŝuoj. La filino miris kaj la patrino klarigis al shi: "Infano malpli alta ol 1 metro ne estas permesata eniri en teatron, sed en tiu paro da ŝuoj vi superos 1 metron." "Do mi nun portu ilin sur mi." "Ne," la patrino diris, "sed tiam vi altos pli ol 1 metron kaj devos pagi por autobuso!"

**Vi jam saĝiĝis**


Junulo venis al kuracisto kaj petis: "Bv. recepti por mi medikamenton, kiu saĝigos min." La kuracisto konsentis. Post semajno revenis la junulo: "Mi sentas, ke mi restas neniom pli saĝa ol antaŭe." Kaj la kuracisto konsilis daŭrigi prenadon de la medikamento. Pasis plia semajno kaj la junulo revenis: "Mi ankoraŭ ne sentas, ke mi estas iom pli saĝa ol antaŭe. Ŝajne vi ne havas tian medikamenton, ĉu ne?" "Jes, vi jam saĝiĝis," respondis la kuracisto kun rideto.

**Freneza vorto**

Oni muelis kolektivan tritikon en muelejo. Eniris maljunulo. Li malfermis sian sakon kaj komencis plenigi ĝin per tritiko. Oni baris al li kun kolero: "Ho avo, kial vi plenigas vian sakon per alies tritiko?" Kaj la maljunulo diris: "Mi estas duonfrenezulo." Ĉiuj ekridis de lia respondo kaj moke demandis: "Sed estante duonfreneza, kial vi ne plenigas alies sakon per via tritiko?" Ĉe tio la maljunulo respondis kun nenia honto: "Se tiel, mi estus tute freneza."

**Dentoeltiro**

Viro venis al dentisto por peti lin eltiri lian malbonan denton. Sed li havis grandan timon kaj la kuracisto longe kuraĝigis lin. Post longa hezito la viro diris: "Mi ne timos, se mi trinkos du tasojn da vino." La kuracisto kontentigis lin kaj demandis: "Ŝajne nun vi ne timas?" La viro suprenvolvis la manikojn, rondigis la okulojn kaj diris: "Jes! Kiu aŭdacos tuŝi mian denton, kun tiu mi batalos!"



**Francesco Mangialardi**



**Solvo de karikaturoj:**
1. Ray Charles
2. Humphrey Bogart
3. Paul McCartney
4. Lady Gaga
5. Rihanna
6. Mahatma Gandhi
7. Martin Luter King
8. Stevie Wonder
9. Mike Tyson

**Urboj sur paĝoj:**
3. Old Havano
5. Varsovio
6. Barcelono
7. Berlino
8. Istanbulo
9. Kopenhago
10. Pekino
11. Delhio
12. San Francisko
13. Novjorko
14. Dubajo
16. Rio de Ĵaneiro
18. Romo
19. Parizo
23. Londono

**Solvo de magia kvadrato:**
1 - GALOPO
2 - ABONAD'
3 - LOGIKO
4 - ONIDIR'
5 - PAKITA
6 - ODORAD'